
Ni aŭdis du specojn de reagoj. Pli bone estis antaŭe (bunte, pli simpatie, pli internacie). Pli bone estas nun (mallonge, bonkvalite). Kun kompreneble ĉiuj nuancoj de kontento kaj malkontento : *La vespero estis altkvalita sed ne tiel bunta kiel mi imagis kaj ĝenis min iomete la ĉeesto de nur kelkaj artistoj sed kun pluraj prezentadoj. Mi preferus laŭ la ĝisnuna maniero t.e. pli da artistoj kun malpli da prezentadoj. Mi komprenas, ke oni certe volis havi*

ludantojn el diversaj landoj. (Jasuo) Konsiderinde pli alta nivelo, kompare kun multaj antaŭaj IAV-oj. Kaj agrable mallonga. (Wera)

Estis certe senteble, ke la kvalito estas multe pli alta ol kutime. La programero por mi sentiĝis pli mallonga ol en aliaj jaroj, sed eble nur pro tio, ke mi tute ne enuis... (Usui)

Madzy : La nova koncepto por IAV laŭ mi estis tre bona kaj ne nur, ĉar mi estis unu el la ĵurianoj (tio cetere al mi tre plaĉis). Ofte tiaj vesperoj daŭradis kaj daŭradis, ĉar ankaŭ tiuj, kiuj ne tre bone kantis, ludis aŭ dancis, restis sur la scenejo. Do, tre bona ideo, mi esperas, ke ĝi sekvontjare estos sama.

Eliza : mi aplaŭdas la eksperimente-



altnivelan programon, sed komparante kun la internacia programo de la ILEI-konferenco en Ostendo, kiun mi partoprenis antaŭ UK, mi preferis tiun, ĉar ĝi estis malpli altnivela sed pli varma kaj ĉarma. Fakte mi estis ĉiam surprizita dum la artaj vesperoj pri la abundo de talentaj homoj kiuj sin prezentas al ni. (Ileana)

Ĉiuj ludantoj estis mirindaj, precipe tiuj du junuloj, precipe tiu pianisto, surprizis min. Mi tre ĝuis la programon, sed IAV ne estis tiel internacia kaj tro profesia. Mi pli ŝatus vidi amatorajn

mon. Ĉu tiu eksperimento estis sukcesa ? Nu, tiel-tiel. Eniris en la programon iuj, kiuj laŭ mi ne havis la necesan nivelon, kompanse elfalis ekz. Aleksander, kiu bandoneonludante havas tre altan nivelon. Ĉu oni estonte tiel kunmetu la programon por IAV ? Ĉijare estis granda fasko, el kiu eblis elekti. Sed se oni en iu posta jaro ne havos tiom da elekteblecoj ? Estus bedaŭrinde reveni al la tre malalta nivelo de iuj tre forgesendaj vesperoj.


CNM

Pri teatro

Por la 100^a UK ni klopodis prezenti riĉan teatran programon. Tio havis tiom grandan sukceson, ke ne ĉiuj, kiuj deziris spekti teatraĵon, povis tion fari. En 13 okazoj estis prezentoj de entute 6 malsamaj teatraj spektakloj, sed tute mankis taŭgaj ejoj por prezenti teatraĵon. Estis problemoj pri la grandeco de salonoj. Homoj frustriĝis, ke ili ne sukcesis eniri salonon. Tamen la organizantoj sekvis la postulojn de aktoroj, kiuj volis ludi en malgranda, intima salono, kiu pli taŭgis por la speco de teatraĵo prezentota. Jen kelkaj impresoj de spektantoj.

Ursula - la krio de infano kontraŭ militoj

La teatraĵo prezentas aŭtentan vivsorton de germanino Ursula. Dum la 2^a mondmilito ŝi estis kiel senkonscia bela blonda infano aligita al la nazia rasprotekta programo nomata *Lebensborn* (vivofonto), kies celo estis “bredado” de “superhomoj”. Malgosia Komarnicka en la rolo de Ursula prezentas militajn travivaĵojn de tiu berlina infano, sed ankaŭ prezentas kontraŭstaran flankon de la barbara plano, nome la tragikan sorton de infanoj de Varsovio interalie tiun de Ludoviko Zamenhof, la nepo de la kreinto de Esperanto, pelita en la geton. Aŭtoris la teatraĵon Roman Dobrzyński, adapte el lia libro “Bona Espero : idealo kaj realo”.



Tiu teatraĵo rikoltis multajn laŭdojn. Ĝi estis prezentita en ĉeesto de la protagonistoj, kio igis la tuton ankoraŭ pli emociplena. *La prezentmaniero estas sobra kaj konvinka, sed estus dezirinde, ke la teamo havu helpon de teknikisto (lumigisto), kiu subtenus la prezentadon per akordigita lumigado. Por tiu ĉi prezentaĵo la ĉambro « Berthelot » estis tute netaŭga, ne nur pro sia malvasteco. La homamasigo antaŭ la salono dufoje trioblis la disponeblajn lokojn. Tial necesis tria prezento en la taŭga scenejo « Lapenna » (Wera). Bonega temo, kuraĝa entreprenado prezenti preskaŭ sola la tuton (Gerrit), bonega spektaklo pri mirinda virino (Madzy). Mi ĉeestis la unuan prezenton kaj kompatis la aktorinon, ĉar bruis en la kulisoj sed ŝi majstre provis adaptiĝi kaj koncentriĝi (Renée). Mi legis la libron, volis spekti nepre la teatraĵon. Estis pli ol mi esperis, bonegege, eĉ moderna dank' al la krommuntaĵo de bildoj kaj muziko ! Mi esperas revidi ĝin ! (Fabienne)*

Feliĉas ĉiuj

La problemoj de migrantoj aktualas. Sed kiu estas la vidpunkto de la migrantoj ? Kiom “nia” oni povas deklari la landon de ni loĝatan, kial ni rajtas nin nomi mondcivitanoj se tiu mondo ne estas



egale alirebla por ĉiuj ?

Tial estis imagita ficcia komunumo de migrantoj, kun propraj ritoj, dancoj, vestoj, gestado kaj ankaŭ lingvo por doni tutmondan karakteron al tiu komunumo, kiel lingvo estis elektita Esperanto. La migrantoj parolas Esperanton kaj la italoj la italan.

La spektaklo rakontas migradon de la patrolando ĝis la alveno en Italujo, kun esperoj, seniluziigoj kaj humiligoj. La samaj aktoroj rolas kiel gastigantoj kaj gastigatoj, kun daŭra interŝanĝo de roloj, lingvoj kaj perspektivoj. Okazas renkontoj kaj kunpuŝoj, maloftaj interkonsentoj, multaj miskomprenoj.

La Kolektivon Kontraŭkanto reĝisoras Clara Sancricca. La spektaklo debutis en 2011 kaj ekde tiam estas prezentita en lernejoj, teatroj kaj universitatoj.

Multaj ŝatis la spektaklon, pro la aktualeco de la temo kaj pro la profesieco de la enscenigo kaj de la aktoroj. Tamen aliaj plendis ke ĝi ne estas facile sekvebla, pro la malbona aŭdeblo, la ne ĉiam klara prononco kaj pro la lingvo-mikso. *La temo kaj verko kaj la aktorado plaĉis*

al mi. Sed mankis io por ke ĝi estu tute bona : la kvanto de frazoj en la itala (kun projekciitaj tradukoj) estis troa, mi devis senĉese levi la kapon por legadi... kaj la esperantaj partoj ne ĉiam estis sufiĉe bone prononcataj (mi estis en la lasta vico kaj ne ĉion bone audis) kaj ĝenis, por la kompreno, la multaj antaŭnomoj en formo de prepozicioj, kiuj konfuŝigis la tekston (JM Cash).

Inteligenta kaj bela surscenigado de tikla problemo. Jen sukcesa ekzemplo de alproprigo de la esprimkapablo de nia lingvo fare de «palvizaĝuloj». Aldonendas la perfekta kunrolado de la junaj ludemaj aktoroj. Bona ekzemplo de ebla prezento de teatraĵo al alilingva publiko (Edmond L.).

Interesa spektaklo pri arde aktuala temo. Realigita fare de juna trupo kun neordinaraj ideoj de « fremdigo »: inventita popolo kun elpensitaj kutimoj kaj « ekzotika » lingvo (Esperanto). Plaĉis ankaŭ la uzo de « ŝildoj » por rigidige karakterizi la « malbonulojn ». Malpli bone la ne sufiĉe klara neceso de fuĝo de la « fuĝuloj » kaj la tro akra partiece kontraŭ la gastigantoj (kiuj fakte ankaŭ havas siajn problemojn). Iom pli ekvilibra prezento de la perspektivoj povus akriĝi la konflikton kaj altigi la dramecan valoron. Sume, nepre prezentinda kaj subteninda entrepreneno ! (Wera)

Feliĉas ĉiuj estas bonega teatraĵo tre originala. Precipe mi admiras la mirindan uzadon de la “maskoj”. Kaj la grupo kiu prezentis klason estis por mi tiel tipe Itala, ke tuj mi min sentis reenmetita en la pasintecon, kiam kun lerneĵanoj el Nederlando ni vizitis klason en Romo. Bonege farite! (Gerrit) Feliĉas ĉiuj estis mia plej ŝatata spektaklo kaj programero. La rakonto estis vere interesa, ĉar ĝi foje montras la vidpunkton de la migrantoj mem. Ni tro aŭdas pri la problemo de la amasmigrado, sed ni neniam demandas nin kiel la migrantoj vidas kaj travivas tiun saman problemon. Mirinde estis, ke tiu ĉi serioza problemo iĝis ege amuza kaj la italaj prijuĝoj estas bonege ilustritaj kaj primokitaj ! La aktoroj estas bonegaj kaj la tuta spektaklo originala kaj neordinara, ĉefe la ideo de la paneloj por la itala parto. Bonŝance, estis la tekstoj, se ne, oni tute ne povintus kompreni la plej amuzajn partojn kaj la primokon de la italaj prijuĝoj... (junulino) Mi estas ankoraŭ entuziasma ! Jes, la lingvorego estis ne tute kontentiga, jes, la teatra salono ne estis perfekta, jes, la teknika flanko estas plibonigebla. Sed finfine denove plurpersona teatraĵo kun terurege aktuala temo prezentita de engaĝitaj aktoroj, kiuj esence prononcis Esperanton pli bone ol iuj aliaj “esperantistaj” aktoroj! La stilo estis nuntempa, senpolva (Eliza).

Duonserioza lekcio pri Dante kaj Francio

En la 750-a datreveno de la naskiĝo de Dante Alighieri, Giuliano Turone proponis movoplenan kaj eferveskan monologon, kie la rilato malkvieta kaj multforma inter Francio kaj la pleja itala poeto fariĝas konduka fadeno al prezentaĵo riĉa je surprizaj kaj ofte superrealaj deflankiĝoj.

Giuliano Turone estas itala juristo, teatraro kaj granda amanto de Dante Alighieri.

Ĉu teatraĵo prelego ĉu prelegeca teatraĵo ? Apenaŭ estis kritikoj pri tiu prezento.

Plej plaĉis al mi la leciono pri Dante, kiu, kvankam monologo, estis tre agrable ludata kaj plena je humuro. Mi ne scias, ĉu mi lernis multe pri Dante, sed poste mi memoras nur la humuron kaj bonegan aktoradon... (Jeanne-Marie). Laŭ mia observo kiel leginto de la Dia Komedio la ŝercado pri Dante estis la plej inteligenta kaj amuza prezento (Edgar). Verva kaj interesa; certe ĉeestinda (Geoffrey). Estis tre bona kaj informiva leciono. Vere plaĉis al mi lia prezentmaniero. Li altiris la atenton de la homoj kaj samtempe vere gajigis ilin (Ina). BONEGA! Ĝi meritis pli grandan ĉambron aŭ salonon, ne ĉiuj sukcesis eniri kaj spekti (Eliza). Lia ludmaniero estas certe tia, ke ne ĉiu ĉeestanto komprenas la seriozecon, sed ni ĝuu lin, dum li akceptas prezenti siajn subtilaĵojn (Edvige).

La Viro-Semo

En 1852, Napoleono Bonaparto organizas sian propran ŝtatrenverson kaj fariĝas imperiestro. Tiucele, liaj armeoj sovaĝe punas la respublikanojn kiuj ribelas. En provenca vilaĝo kiu fervore luktis, restas nur virinoj kiuj devas plenumi ĉiujn taskojn kaj pluvi dum du jaroj, solaj kun timo, ĉagreno, fizika manko de viro sed ankaŭ kuraĝo kaj espero ke baldaŭ venos viro. Kaj jen, tio okazas... Ĉu la ĵuro pri kiu ili interkonsentis fariĝos la plej bona ideo ? Duvoĉa teatraĵo de Violette Ailhaud.





Tradukita de Daniel Moirand.

La esperanta versio premieris en la UK, ludita de «La Cikadoj», esperanta sekcio de la franca teatra kompanio «Les Cothurnes» el Aix-en-Provence.

La aktorinoj prezentis la teatraĵon 4-foje, sed tio ne sufiĉis por ke ĉiuj interesiĝantoj ĉeestu. *Estis tiom da spektantoj, ke ni devis reiri kaj atendi 45 ĝis 60 minutojn en la vico* (Alain).

Ofta plendo la ne-taŭgeco de la salono. Aliflanke oni devas admiri la aktorinojn kiuj sukcesas ludi en tiaj kondiĉoj.

Iom malfacile kompreni, sed du virinoj tre lerte ludis en tiu malgranda salono kun nur tablo kaj seĝoj. Mi ĝuis la teatraĵon multe (Jasuo). *Serioza temo, kiu povus esti emociiga, sed la monologa formo - eĉ ludita de du aktorinoj -, ne helpis. Krome, la formo de la salono, sen scenejo, sen obskuro, malhelpis ke oni sentu sin mergita de la rakonto* (Ina). *Mi ege aprecis la intensan kapablon esprimi ĉion per trafa lingvo kaj esprimiva gestaro* (Henriette). *Bonega dramo, bele adaptita, tre interesa intrigo* (Geoffrey). *Bona kaj eterna temo traktita emocie* (Renée).

Ĉagrenegoj

Gabrielo certiĝas ke ŝia edzo ŝin kokras. Sed Karolino tion ne povas kredi ! Ĉu eblas ? Certe tio ne estas ordinara afero. Nun indas ĉion priserĉi, devas ekzisti indikilo...

«Ĉagrenegoj» estas adapto de franca teatraĵo de Courteline *Gros chagrins*,

kiun pretigis la trupo Kvak. Unuafoje Kvak prezentis teatraĵon ekskluzive kun profesiaj aktoroj.

Plej miksitajn reagojn ni ricevis pri tiu spektaklo.

Pri la enhavo, nu, ĉu kompreni ĝin kiel kvazaŭ seriozan aferon, ĉu kiel parodion de tiaj senenhavaj komedioj ? Adapti 7-minutan komedieton al preskaŭ tuthora spektaklo postulis certe lertecon.

Al kelkaj plaĉis. *Mi vidis la spektaklon Ĉagrenegoj, kiun mi trovis amuza* (Ernst). *Kiel teatraĵon ni vidis nur «Ĉagrenegoj» kaj ĝi plaĉis al ni* (Rafi). *Ne gravis la temo, sed admireblis la ludkapablo de la geaktoroj ! Kaj ĉar mi ne malamas absurdaĵojn...* Komento de viro : *plaĉis al mi la aktorinoj !* (Edmond L.)

Interesa, se oni pretas kompreni ĝin kiel satiran persiflaĵon (permesu la

dio sen tre profunda mesaĝo al mi (Martin). *«Ĉagrenegoj» estis - almenaŭ por mi - de la komenco kaj komplete ĉagrenego. Tiu pleno je kliŝoj ludanta en etoso de la 50^{aj} jaroj estis apenaŭ eltenebla. Mi bedaŭras nur, ke iu eluzis tiom da energio por traduki tiun laŭ mi ne indan tekston. Ni bezonas multajn bone ludeblajn teatraĵojn, sed ne tiun (Ina). Mi bedaŭrinde sukcesis spekti nur «Ĉagrenegoj». Mi ne vere ŝatis la enhavon mem, laŭ mi ne interesan kaj do bedaŭras, ke por tia malplenaĵo oni misuzis la realan talenton de la aktorinoj (MT).*

Antaŭ 100 jaroj la farso probable ridigis la publikon pri la senenhava vivo de nenionfarantaj burĝaj edzinoj. Sed modernigita, transmitita en nian tempon, ĝi fariĝas plene sensenca. Kvankam profesiece prezentita ĝi



neologismoj) de komedioj. Aliflanke al ĝi tute mankis enhavo, sed tio- laŭ mi estis la satira metodo (Edgar). *Ne tiom amuza, kiom oni supozintus. Kulpas pli la dramo mem ol la aktorado* (Geoffrey). *Laŭdiraj profesiuloj, kiuj ludis amatorece. Tro da krioj kaj ridegoj, laŭtigataj de laŭparoliloj. Ofte revenis la franca akĉento. Eksmoda temo. Mi nek ridis nek interesiĝis* (Renée). *Absoluta perdo de la tempo ! Stulta, frenzeta, histeria, eĉ problemoj por kompreni la vortojn - absurdaĵo !* (Edvige) *Ĉagrenegoj, kvankam bone aktorita, ne forte kaptis min. Ĝi estis leĝera kome-*

tamen restas pufigita nenio. En meze granda teatro ĝi malgraŭ ĉio eble povus distri enuintan publikon, sed en la plej prestiĝa salono Zamenhof, kvazaŭ pinta kulturaĵo de la 100^a UK, ĝi tuŝis min iom embarase (Wera).

La Vermeto

Ĉarma prezentaĵo pri raŭpo, kiu transformiĝas al papilio, unue pantomime, poste kun teksto. Evidente jam ofte prezentita – la infanoj parte jam junul(in)as. *Aminde distraĵeto.* (Wera)

Claude Nourmont

Prelegvojaĝo

Turneo 2015 de Zhang Fude, sinteza raporto

Antaŭ ol prelegvojaĝi en Germanio kaj partopreni UKon en Lille kaj Ekumenan Kongreson en Strasburgo, Zhang Fude el Ĉinio vizitis en Francio 14 klubojn aŭ aranĝojn de la 29^a de majo ĝis la 4^a de julio. Li ĉefe prezentis historion de sia kristana familio dum la japana okupado kaj sub la komunisma reĝimo, kion ilustris belaj familiaj fotoj. La dua temo rilatis al lia sperto dum la tiel nomata Kultura Revolucio, kiu devigis lin labori kiel kamparano dum tri jaroj. Fude ankaŭ prezentis fotojn pri sia urbo Lanzhou.

Videble, pluraj kluboj travivis malfacilaĵojn por interpretadi la tekstojn kiujn laŭte legis Fude. Aliaj bedaŭris, ke li ne klare kaj kelkfoje tute ne, respondis demandojn. Tiuj kluboj metas la demandon « ĉu estis mis/nekompreno aŭ ia hezito por respondi? ».

Tamen la temoj plaĉis. Estis pluraj demandoj de la ĉeestantoj kaj pli ol kutime aperis gazetaj raportoj, eĉ venis tri ĵurnalistoj en Romans. Aperis artikoloj en Périgord (Sud-Ouest kaj Dordogne Libre), en Châteauroux, en Calvados (Ouest-France), Romans (Dauphiné Libéré), Lannion (Le Télégramme) kaj en Vendée (Ouest-France).

Proksimume 220 homoj ĉeestis la prelegojn de Fude, plej ofte esperantistoj kaj kvar klasoj de bazlernejoj en Périgord.

Fude sentis sin komforta en la privataj rilatoj kaj dum la vizitoj en lernejoj (en klasoj kun Claude Labetaa). Multaj kluboj laŭdas lian afablecon, kiel resumas Maryvonne Houviez el Châteauroux. « Afabla kaj diskreta viro ĉiam preta por helpi » kaj Bruno Masala « La restado ĉe ni estis tre agrabla. La geinfanoj tuj akceptis lin kaj amis lin, kiel bonhumoran kaj pacan avon ». En Lannion, homoj jam antaŭvidas vojaĝon al Ĉinio. En la Abatejo de Bricquebec, dum Ĝenerala Asembleo de la normandanoj,

Fude renkontis Zef Jegard, kiun li gastigis en Ĉinio en 2001 kiam Zef bicikladis de Pakistano ĝis Vladivostoko. Prelege, bicikle, Esperanto tre utilas por transiri la limojn.

Yves NICOLAS



Amiko foriris

« FORPISIS GENI »

Ku n doloro ni eksciis pri la forpaso de Eugène WERMELINGER, la 11an de aŭgusto 2015. Li estis aktiva esperantisto, gvidis kursojn kaj eĉ kreis sian propran metodon. Li partoprenis en la Esperanto-movado kaj prelegis okaze de staĝoj kaj kongresoj. Samtempe li estis tre valora amiko, kiu kapablis kompreni la homojn kaj transdonis utilajn konsilojn per ret-paĝoj. Li estis gastigema kaj bonhumora, ŝatis ludi per la lingvoj, per la vortoj por iel kontentigi ĉiujn.

Li loĝis kaj laboris en Sud-Alzaco dum 40 jaroj kiel estro en nutraĵo-industrio. Li fondis la « Internacian Centron de Esploro kaj Dokumentado pri Vivantaj Nutraĵoj » (CIRDAV).

Li verkis du librojn, *Rakontoj de eta Alzacano*, tre ĉarmaj rakontoj, kaj *Solvoj por bona vivo*, kompilaĵo de 26 « Geniaj Leteroj ».

Li naskiĝis en Colmar en 1941 kaj emeritiĝis en la naskiĝvilaĝeto de sia edzino en Burgonjo.

Li estis eĉ amiko de la eks-prezidento de Aŭstrio Franz Jonas, ankaŭ esperantisto.

Roberto KUENY, de Mulhouse-Esperanto



Un nouveau projet Grundtvig arrive à son terme

Du local au mondial, les nouveaux défis du bénévolat

Les différentes organisations partenaires viennent de différents pays européens (Pologne, Écosse, Italie, France, Lituanie).

Le partenariat a été axé sur la gestion des associations à but non lucratif et ONG, la planification stratégique et le développement organisationnel, avec un accent particulier sur l'activité locale – qui conduit souvent à un niveau d'activité internationale. Les barrières linguistiques ont été surmontées grâce au choix de

l'espéranto comme principale langue de travail du projet, également maîtrisée par tous les représentants impliqués dans le projet.

Grâce au partage et à la professionnalisation, les organisations concernées, actives au niveau local, ont partagé les meilleures pratiques dans un contexte positif, constructif et européen.

Le travail a été centré sur six rencontres transnationales, chacune d'entre elles ayant porté sur un domaine d'intérêt spécifique pour les associations, avec un

accent particulier sur l'activité locale. Les objectifs visés par le projet ont été



Raporto el Ostendo

ILEI-konferenco

Bonŝancaj estis la homoj kiuj aliĝis al la 48-a ILEI Konferenco en Ostendo de la 17^a ĝis la 25^a de julio 2015. Belega vetero atendis nin, tre komforta junulargastejo ebligis al ni bone ripozi kaj bone labori, varma akcepto de la LKK-anoj kaj de la urbo plaĉis al ni kaj buntega programo ĉiutage devigis nin elekti iun programeron kvankam alia ero samtempe okazanta estis tre alloga.

Pli ol 150 homoj vojaĝis al Ostendo el 34 landoj el 4 kontinentoj.

La Interkona Frandvespero ebligis al ni gustumi tre diversajn tipajn manĝaĵojn kunportitajn de la partoprenantoj. Oni ricevis klarigojn pri ili kaj tiel ni jam interkonatiĝis kun homoj el tre diversaj landoj...

Iu grava manko laŭ mi estas ke preskaŭ neniuj kunportis trinkaĵojn, estis malfacile tosti sen vino ! Ĉu nur franca bedaŭro ? Samtempe neniuj ebriiĝis kaj ek al la laboro la sekvantan tagon sen kapdoloro.

Instruistan trejnseminaron partoprenis pluraj el ni kaj debatoj estis viglaj kaj espereble fruktodonaj. Ĉefe intervenis Mirejo Grosjean, Katalin Kováts, Zsófia Kóródy, Duncan Charters, Elisabeth

Le Dru, Radojica Petrović, Monika Molnar.

Granda sukceso estis la Lingva Festivalo. Dum horoj trideko da lingvoj estis prezentitaj kaj pli kaj pli homoj konscias pri unueco kaj diverseco !

La temo de la Simpozio estis Lingva justeco kaj paco, kiuj defioj por la nuna mondo ? Ĝi ekis per la ĉefprelego de D-ro Réginald Moreels, belga kuracisto kun kirurgia specialiĝo, membro de la internacia, neŭtrala medicina helporganizo *Kuracistoj sen Limoj*. Li entreprenis plurajn diplomatajn misiojn al landoj en milito kaj al teritorioj trafitaj de naturaj katastrofoj. Lia agado montras klare, ke li volas kontribui al la kreo kaj konservado de paco ĉie ajn en la mondo kaj doni al homoj homan vivon. Sekvis prelegoj de famaj esperantistoj laŭ diversaj aspektoj de la temo kaj ege plaĉis al mi la prelegoj de D-ro A.Giridhar Rao pri la falsa promeso de la angla en Barato kaj lia forta instigo al propono de rimedoj per uzado de lingvo de solidareco, tio estas Esperanto. Same la demando de Huang Yinbao-Trezoro « Ĉu Esperanto havas ŝancon en Ĉinio ? » Dum la ĉina lingvo fariĝos komunika lingvo ene de la lando, ĝi

ne povos ludi rolon por dialogi kun la mondo. Tre diversaj lingvoj kreskas en Ĉinio, radio elsendas en pli ol 75 lingvoj, inter ili Esperanto. Ni devas aŭskulti ĝin, reagi, sendi mesaĝojn... tiel helpi al ĝia disvastigo.

Ne mankis agrablaj vesperoj, prezentado de la filmo de germana kuracisto kun subtitoloj en Esperanto, Eŭropa vespero, internacia vespero, bankedo kaj balo kun lokaj muzikistoj, adiaŭa vespero kunkantante kun Mikaelo Bronŝtein.

Nova estraro estis elektita, daŭre prezidato Mirejo Grosjean, iĝis sekretario Emile Malanda Nianga el Sud Afriko, daŭre William Harris (Vilĉjo) zorgos pri financoj kaj kvar membroj el diversaj kontinentoj Radojica Petrović, Elena Nadikova, Ivan Colling kaj Prof. d-rino Xiaofeng Gong, (Arko).

Varmajn dankojn al la diversaj organizantoj.

Monika

*Se vi deziras aboni al la Revuo, ĝi kostas 24 € kaj zorgas pri tio Esperanto-France, se vi deziras subteni ILEI asocion vi povas membriĝi tiel vi pagos 20,50 € kaj vi ricevos la revuon, peras « monique.arnaud@aliceadsl.fr »

atteints grâce à l'organisation de ces six réunions transnationales. Chacune d'entre elles s'articulait autour d'un élément spécifique dans le domaine de la gestion :

- Réunion de démarrage et 1^{er} Séminaire de formation (Trieste, Italie, Octobre 2013) avec comme thème les TIC, les réseaux sociaux et les outils internet – souvent un point faible pour les personnes défavorisées ou âgées ;
 - 2^{ème} Séminaire de formation (Toulouse-Auzeville, France, Février 2014) sur le travail en équipe, les équipes interculturelles, la gestion des bénévoles, essentiels pour les associations à but non lucratif. Notions d'organisation de spectacles et techniques du son ;
 - 3^{ème} Séminaire de formation (Pitlochry, en Écosse, Juin 2014) sur la gestion des finances, la collecte de fonds et la recherche de subventions (souvent un point faible pour les associations à but non lucratif gérées par des bénévoles) ;
 - 4^{ème} Séminaire de formation (Visaginas, Lituanie, Août 2014) avec comme sujet l'organisation d'activités pour les organisations locales et l'organisation d'un festival local ;
 - 5^{ème} Séminaire de formation (Białystok, Pologne, Décembre 2014) sur la coopération avec les autorités locales et les établissements d'enseignement (les écoles, les universités etc.).
 - 6^{ème} Séminaire de formation (Vercelli, Italie, Mars 2015) sur la gestion de soi-même, la maîtrise individuelle (gestion du temps et du stress, motivation, prise de décisions, résolution de problèmes) ;
 - Réunion bilatérale entre Białostockie Towarzystwo Esperantystów et Scottish Esperanto Association (Helensburgh, en Écosse, Juin 2015)
 - Réunion bilatérale entre l'Association Espéranto d'Écosse et Visagino Tarptautinės Esperanto Kalbos Klubas Espero (Visaginas, Lituanie, Juin 2015)
 - Réunion de coordination finale et activité de diffusion (Lille, Juillet 2015)
- À chaque réunion, toutes les organisations ont partagé leurs expériences et des formateurs expérimentés ont été invités pour les séminaires spécifiques. Cela a

contribué à fournir un ensemble commun de compétences pour les bénévoles et a créé un échange positif d'expériences dans une dimension de coopération internationale, tant au niveau local qu'au niveau international.

LES RESULTATS

- Un vade-mecum a été produit pour diffuser efficacement les activités accomplies avec succès par les associations/ONG locales. Ce vade-mecum a été rédigé en espéranto et traduit dans les différentes langues nationales. Il est disponible au format brochure papier et en PDF imprimable. Il recueille rapports, photos, sur les meilleures pratiques provenant des activités du projet (<http://aktivu.enkidu.coop/fr/aktivu/brosuro-de-la-projekto>).
- Site web - Du local au mondial. Le site du projet multilingue fonctionne à la fois comme canal de diffusion principal et comme boîte à outils de formation web. Il recueille présentations, photos, vidéos et matériel provenant des séminaires de formation réalisés durant le projet. Cela contribue de manière significative à la durabilité du projet après sa clôture, tant au niveau local qu'au niveau international (<http://aktivu.enkidu.coop/fr>).
- **Présentation publique à grande échelle des résultats du projet.** Le Partenariat a présenté le projet Grundtvig et ses résultats de manière significative à un large public (environ 2700 personnes venant de 80 pays des 5 continents) à plusieurs reprises au cours du 100^{ème} Congrès mondial d'espéranto (Lille, FR, 25/07-31/07/15) avec le 25-07 la tenue d'un stand à la «Movada Foiro» (Foire des associations d'espéranto) du congrès mondial d'espéranto pour la diffusion du projet avec présentation du Vade-Mecum, une présentation publique détaillée du projet dans le cadre du «Kleriga lundo» (lundi d'études) du congrès mondial d'espéranto (plusieurs interventions, projections de documents et vidéos, réponses aux questions soulevées par le public). Le 30-07 l'organisation et la présentation d'un spectacle de Sepa &

Asorti, partenaires lituaniens du projet (concert dans le cadre du projet intégré au programme du congrès mondial d'espéranto).

Les mobilités transnationales et les six séminaires de formation prévus pendant la durée de vie du projet ont été des outils très puissants pour améliorer les compétences des participants et pour la promotion de la compréhension interculturelle. Tous les séminaires de formation ont souligné l'importance de la notion de citoyenneté européenne active à travers le volontariat, avec un accent particulier sur l'action au niveau local.

En outre, les visites d'étude bilatérales ont contribué à renforcer la coopération internationale entre les partenaires intéressés par un sujet particulier.



Le projet a contribué à accroître les connaissances et la compréhension mutuelle entre les bénévoles qui partagent les mêmes idées, activement engagés dans leurs associations au niveau européen.

La participation à ce projet a donné à l'association des idées pour de futures activités et la participation à d'autres projets européens. L'association EUOKKA envisage après la clôture définitive de ce projet de participer à un nouveau partenariat dans le cadre d'Erasmus+ - qui est, dans une large mesure, une activité issue des résultats de ce Partenariat Grundtvig.

(d'après le rapport final du projet Elloke Tutmonden)



Programme d'éducation et de formation tout au long de la vie

Monda Pufestivalo 2015 en la urbo Higashikagawa



La Pupekspozicio estas evento ĉiujare organizata de la Komitato por la Monda Pufestivalo (<http://world-doll-festival.org>) kaj okazanta en malnova, tradicia domo nuntempe uzata kiel kulturcentro. Ĉi-jare ĝi kalkulis je la aŭspicio de la Ambasadro de Francio en Japanio, la Japano-Franca Instituto, Universala Esperanto-Asocio kaj Espéranto-France.

Kun la mirinda nombro de 15 000 vizitantoj finiĝis la 5a Monda Pufestivalo en la urbo Higashikagawa loĝata de 32 000 personoj. Al tiu sukceso kontribuis 15 mencioj en la japanaj amaskomunikiloj kaj pliaj informoj en ĵurnaloj, TV kaj radio eksterlande.

La pupkolekto nun sumiĝas je 1 390 pupoj vestantaj tradiciajn kostumojn el 70 landoj kaj ĝi estas farita danke al la tutmonda Esperantistaro. Inter la francaj pupoj troviĝas ekzemploj mane faritaj el diversaj regionoj de la lando : porcelanaj pupoj, riĉa kolekto de provencaj statuetoj, pupoj portantaj tradiciajn robojn de diversaj regionoj kaj eĉ pupoj pri reĝinoj.

Marie-Antoinette kaj Anna de Bretonio, plejparte donacitaj de gesinjoroj Lafargue el Parizo. Plie, estas donacita trideko da pupoj el 15 landoj, kiel Hispanio, Italio, Peruo ktp.



La gastoj estis bonvenigataj en la ĉefsalono per bildo de Catherine Deneuve farita de amatora pentristo kaj afiŝoj pri diversaj francaj regionoj. La pupoj estis montrataj en budoj tra la urbo kaj ĉie estis fotoj kaj informoj pri la Mondaj Kulturaj Heredaĵoj listigitaj de UNESKO en la 70 landoj partoprenantaj la Festivalon.

Speciala gasto estis la franca kantisto JoMo el Tuluzo, kiu ĉiutage koncertis kaj dancigis la ĉeestantarojn, i.a. la vic-urbestrinon. Li estas menciita en la Guinness-Libro pri Rekordoj pro kantado en 22 lingvoj en la jaro 2000. La kulturan programon kompletigis dancoj fare de lokaj grupoj : flamenko,

havajaj, ventra kaj folkloraj dancoj. Virina grupo, krome, rakontis fabelojn al infanoj kaj ventroparoladis. Plie, 40 budoj ofertis ampleksan menuon de internaciaj pladoj.

La enketiloj montras, ke 2/3 el la vizitantoj estis virinoj ; 60.1% estis pli ol 50-jaraj ; 53.4% konsideris ĝin ege bona kaj 46% bona. Ankaŭ infanoj povis lerni pri la mondo kaj kulturaj diferencoj ! Estis speciala danko al la volontuloj. Ili esprimis, ke ili volus estonte vidi pupojn el Nordameriko, Anglio, Japanio, Rusio, Germanio ktp kaj pupojn pri historiaj homoj.

(laŭ raporto de Etsuo Miyoshi, prezidanto)



Muzike

Kajto Flugas

Jam la sepa KD de la duopo Kajto, unu el la plej malnovaj grupoj en la katalogo de Vinilkosmo. Ilia debuto datiĝas jam de 1989, sed ili ankoraŭ same energias kaj inventemas.

“Kajto Flugas” estis prezentita unufoje dum UK en Lille en julio 2015, kun 14 novaj kantoj el 15, kun versio de “Mi memoras”, vera klasikaĵo, aldonita por altgrade spici ĉion.

La KD-albumo disponeblas en la reta diskoservo de Vinilkosmo kaj la bita albumo disponeblas elŝute (MP3 kaj ogg).



(laŭ la blogo de Vinilkosmo, www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo.html)



Bhaktapur (Nepalo), 8 monatojn post la tertremo

Bhaktapur Darbar Square estas unu el la mondheredaĵoj de UNESKO en Nepalo. Ĝi havis damaĝon pro la tertremo ĉi-aprile kaj perdis sian belecon. Ĝi estas loko, kiu situas en la plej malgranda distrikto de Nepalo, nome Bhaktapur. Tiu ĉi distrikto situas 13 km oriente de Katmanduo. Bhaktapur Darbar Square estas plej ŝatata vidindaĵo en la Valo de Katmanduo. Tiu ĉi placo estis severe damaĝita pro la tertremo en la jaro 1934, sed oni tre bone revivigis ĝin. En la 25a de aprilo 2015 ĝi perdis multajn konstruaĵojn. Grava templo de Bhaktapur-placo perdis sian tegmenton kaj alia belega pagodstila templo ne plu staras, ĝi tute detruigis. Feliĉe unu alta pagodstila



Pagodstila templo, kiu altiras la atenton de la homoj, proksimigas turistojn al ĝi. Feliĉe ĝi ne havis grandan vundon dum la

tertremo. Nur en la supra parto ĝi estas iomete difektita. Flanke de la templo homoj apogas siajn domojn per lignaj apogiloj.

Ĉefa pordo de la placo. Leono gardas la pordon de la placo. Feliĉe ĝi sukcesis travivi la tertremon kaj bonvenigas

vizitantojn. Ĉi tie antaŭ la tertremo firme staris 5 etaĝa pagodstila templo, sed tertremo tute detruis la tem-


plon. Nur la gardistoj (elefantoj, leonoj, virbovoj) de la templo atente zorgas pri la movoj de la homoj.

En la mallarĝa strato domoj estas apogitaj per lignaj apogiloj, kvankam lignaj ne estas fortaj kompare kun feraj apogiloj. Sed pro la multekosteco de fero, homoj uzas lignon por savi siajn domojn.

(el la blogo de Pradip Ghimire)



templo staras kaj allogas homojn al ĝi. Estis mia unua vizito al tiu placo post la tertremo. Jen kelkaj fotoj, kiujn mi faris dum mia promenado ĉirkaŭ la placo.



En 2016, Rendez-vous à Marseille !

Du 5 au 8 mai, congrès euroméditerranéen d'espéranto

Bientôt plus d'informations sur www.esperanto-france.org

